

Leterkesto
Claude Gacond, 386-a radioprelego, 1971.03.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ ni salutos la geaŭdantojn, kiuj skribis al ni.

A.- El Britio ni ricevas tre regule leterojn de gesinjoroj B. Najbaro en Keighley. Semajnon post semajno ili esprimas al ni siajn vidpunktojn pri niaj prelegoj, kiujn ili tre atente aŭskultas. Pri la libro *Interpopola Konduto* de Edmond Privat, kies multajn erojn ni legis al vi dum prelegaro, ili faras demandon, kiu povas interesi aliajn geaŭdantojn : « *Ĉu Edmond Privat skribis tiun libron en la internacia lingvo ?* »

Cl.- Ni respondos dirante, ke tiu verko unue aperis en la franca sub la titolo *Le Choc des patriotismes*, tio en 1931, kaj la esperanta eldono, kiun Edmond Privat mem reverkis en esperanto, kaj kies teksto foje malsimilas de la franca verko, aperis en 1935. Nun tiu libro estas tute elĉerpita. Por la angloparolantoj ekzistas angla mallongigita eldono, kiu aperis en 1948 sub la titolo *The Clash of Loyalties*. Ĝi estas la frukto de prelegoj, kiujn Edmond Privat faris en la angla ĉe kvakera kunsido okazinta en Edinburg. Tiu anglalingva verko ne estas elĉerpita, kaj skribante al ni vi povas ĝin aĉeti je la prezo de 7.50 svisaj frankoj plus la sendkostoj. Eble kelkaj britoj interesiĝos pri tiu verko *The Clash of Loyalties*.

A.- En Britio ni ankoraŭ deziras saluti gesinjorojn John Browlee en Upminster.

Cl.- En Ĉeĥoslovakio sinjoro Jiri Patera estas atenta aŭdanto. Kiel pluraj geaŭdantoj li ŝatus pli longajn kaj pli multajn esperanto-programojn. Kiam alvenos centoj da similaj petoj, tiam tutcerte similaj deziroj estos efektivigitaj. Sed fakte ni devas agnoski, ke la esperanto-korespondaĵoj ne tre abundas.

A.- En Finnlando ni salutas sinjoron Harri Laine en Nupuri.

Cl.- En Francio ni ricevis salutojn de sinjoro B. Cheverry en Angers, kiu sendis interesajn informojn pri Kastelo Grésillon. La venontan semajnon ni parolos pri tiu Kulturdomo, kies programoj estas diskonigendaj. Ankaŭ salutis sinjoro A. Dumarquez en Anzin, sinjoro Henri Coulon kaj sinjorino E. Kohler en Besançon. Tiu aŭdantino prave konsilas al la esperantistoj unue uzi la internacian lingvon en siaj kontaktoj kun eksterlandanoj. Sed ni konstatis, ke multaj esperantistoj faras la kontraŭon. Unue ili balbutas en plej diversaj lingvoj, antaŭ ol kuraĝi ekuzi esperanton. Verŝajne la kaŝita kaŭzo de tiu sinteno troviĝas en senkonscia heredado de normoj valoraj en eksteresperantistaj medioj, kiuj konsideras esperanton kiel malpli valoran lingvon ol la naciajn lingvojn. Kiam la esperantistoj estos veraj dulingvanoj, ili ne plu timos alfronti fremdulojn en la lingvo de Zamenhof.

A.- En Okcidenta Germanio ni salutas plurajn aŭdantojn : sinjoron doktoron J. Kondor en Lampertheim, kiu salutis el Budapeŝto, sinjoron Gerhard Kunze en Wittlensweiler, sinjoron Bruno Siegert en Fürth, por kiu la radio estas la sola kontakto kun la internacia lingvo. Li skribas : « *La voĉoj el la aero estas por mi bela helpilo, koncerne **kontakton** kun la tuta mondo en unu lingvo. Kaj Radio-Bern staras en la unua vico de la stacioj.* » Ankaŭ skribis sinjoro Norbert Merkens en Wuppertal-Barmen kaj sinjoro Alwin Sommer en Hagen.

Cl.- En Orienta Germanio nin aŭskultas sinjoro Ernst Muschall en Halle. Kiel pluraj geaŭdantoj li bedaŭras, ke Pola kaj Svisa Radioj preskaŭ samtempe elsendas sur ondbendoj frekvence tre proksimaj. Ni avertos la direktoron de nia elsendejo pri tiu problemo, kiu tutcerte tendencos komplikiĝi, kiam la daŭro kaj nombro de esperanto-elsendoj kreskos.

A.- En Hungario nin aŭskultas sinjoro Pal Balkanyi en Budapeŝto.

Leterkesto
Claude Gacond, 386-a radioprelego, 1971.03.03 & 06

Cl.- En Pollando sinjoro Andrzej Marszatkowski en Kartvzy regule kaptas la svisajn ondojn. Li deziras ricevi ekzemplerojn de *Svisa Espero*. Ni avertas ĉiujn geaŭdantojn, kiujn ni salutas hodiaŭ, ke ni sendis al ili dankcirkuleron, kiun akompanas tri specimenaj ekzempleroj de la revuo de Svisa Esperanto-Societo, kies titolo estas *Svisa Espero* kaj unu specimeno de la informilo de Kultura Centro Esperantista, kies titolo estas *Monata Cirkulero*. Tiuj informiloj alportos al vi ideon pri la esperanto-vivo en Svislando. Dum serio da elsendoj ni havos la okazon rakonti al vi pri tiu vivo.

A.- El Svedio skribis gesinjoroj Iva kaj Lennart Aberg en Gotenburgo. Ili gvidas la novkreitan Societon por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio kaj la bulteno *Inter*, kiun ili redaktas, donas utilajn informojn diskonigendajn. Dum venonta elsendo ni legos al vi erojn el tiu esperanto-organo. Gesinjoroj Aberg ankaŭ deziras ricevi informojn pri la programita kurso por franclingvanoj, kiun ni nun verkas. Dum prelegaro pri la esperanto-vivo en Svislando ni pritraktos tiun temon.

Cl.- En Svislando ni havas kelkajn regulajn geaŭskultantojn. Okaze de renkontiĝoj, ili avertas nin pri sia aŭskultado. Antaŭ du semajnoj telefonis al ni sinjoro Marcel Erbetta en Biel-Bienne. Kiam ni kaptis la telefonilon ni aŭdis nian propran voĉon. Nia aŭskultanto volis montri al ni, kiel klare li povas nin aŭskulti.

A.- En unu el siaj leteroj sinjoro B. Najbaro rakontas, ke okazas, ke li nin registras por permesi reaŭdadon al blindaj samideanoj. En Svislando ekzistas intima kunlaboro inter nia radio kaj Unuiĝo de la Nevidantaj Esperantistoj, kies prezidanto estas sinjoro Giovan' Antonio Pellanda en Winterthur. Jen ero el letero de sinjoro Pellanda: « *Via afableco disponigi al ni la tekstojn de viaj prelegoj [...] treege helpas al la eldono de **Amika Voĉo**, la sonrevuo cirkulanta ĉiumonate en multaj landoj.* »

Cl.- Ni atentigas la blindulojn, ke ili povas aboni al tiu cirkulanta sonbendgazeto, kaj estas ĉiam kun ĝojo, ke ni scias, ke ĉiuj niaj elsendoj estas de la radio mem atente rekopiataj por tiu blindula gazeto *Amika Voĉo*.

A.- Vi aŭdis babiladon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-